

Por la 20a de septembro 2009, kadre de la [Eŭropaj tagoj de la hereda havaĵo](#) (19an kaj 20an de septembro), la sekretario de la Muzeo de la du venkoj ([Musée des Deux victoires](#)), en [Mouilleron-en-Pareds](#), s-ro Jean-François Bourasseau, proponis al la asocio Espéranto-Vendée aldonon de Esperanto al la franca, angla, rumana, loka (puatua) kaj al la [signolingvo](#), por prezenti, dum “vagado“, diversajn aspektojn de la komunumo [Mouilleron-en-Pareds](#). Kompare al sia loĝantaro, 1232 loĝantoj, ĝi estas unika ĉefe en tio ke, en malpli ol du jarcentoj, kvar patrinoj de tiu vilaĝo naskis kvar famiĝintajn homojn :

- Charles-Louis Largeteau (1791-1857), geodeziisto, astronomo, membro de la Akademio de sciencoj.
- Georges Clemenceau (1841-1929), kuracisto, ĵurnalisto, politikisto, ĉefministro.
- Jean de Lattre de Tassigny (1889-1952), generalo, postmorte nomumita marŝalo, kiu partoprenis el la liberigo de Francio dum la Dua Mondmilito. La 8an de majo 1945, en Berlino, li reprezentis Francion okaze de la subskribo de la kapitulaco de Germanio fare de la feldmarŝalo Vilhelmo Keitel ĉe la stabejo de la soveta marŝalo Georgo Ĵukov.
- Théodore Monod (1902-2000), naskiĝinta en Rouen, naturalisto, esploristo, fakulo pri la dezertoj kaj humanisto, kies patrino devenis el Mouilleron-en-Pareds.

Artikoloj pri [Mouilleron-en-Pareds](#), [Largeteau](#), [de Lattre de Tassigny](#) kaj [Théodore Monod](#) estis speciale redaktitaj por la cirkonstanco por la versio en Esperanto de “[Wikipédia](#)“, kiu tre baldaŭ atingos la 120 000 artikolojn. Artikolo pri [Clemenceau](#) jam ekzistis.

La originaleco kaj la intereso de la iniciato de Jean-François Bourasseau estas en tio, ke li celis alireblecon al hereda havaĵo por plej diversa publiko, sen lingva barilo. La gviditaj vizitoj okazigis vagadon en la komunumo por la multnombra publiko laŭ la muziko de la vortoj.

Fakte, la du vizitoj estis parole prezentitaj per diversaj lingvoj : komence, france, simultane tradukita signolingven, poste anglan, esperanten, rumanan, fine puatulingven. Ĉiu vizito daŭris preskaŭ du horojn, kaj tenadis la atenton de la publiko intergeneracia : la infanoj silentaj, la adoltoj atentaj, la avoj aŭdantaj kun rideto la dialekton. Ĉeestis kelkaj surd-mutuloj, angloj, ankaŭ esperantoparolanto kun la esperanta flago flirtanta aere (Saluton Stéphane !).

La aplaŭdoj kaj demandoj pruvis la scivolon kaj intereson de la aŭskultintoj, inter kiuj la plej aĝaj ekkonis la lingvon Esperanto en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento. Inter ili, viro, kiu frekventis de Lattre de Tassigny, ĉar samvilaĝa.

La posttagmezo finiĝis per simpatia manĝeto dum la gelegintoj konstatis multajn similaĵojn inter la lingvoj Esperanto, la rumana kaj la angla.

Riĉa interŝanĝo por ĉiuj !

La sukceso de tiu iniciato estis tia, ke plaĉis al la partoprenintoj la propono rekomenci venontjare. Krome, ĉar Espéranto-Vendée serĉas lokon por organizi sian piknikon de malkovro 2010, la ideo pri elekto de Mouilleron-en-Pareds progresas ambaŭflanke.

Fine, citaĵo de la ĵurnalisto, verkisto kaj radio-animanto Jacques Chancel : "*Al spektantoj ne nur proponi, kion ili ŝatas, sed ankaŭ kion ili ŝatus*".

Monique Heiderich kaj Henri Masson